



La Kolombo de Paco

15-a de julio 2021, numero 6

Redaktas Dmitrij Ševčenko kaj Anna Striganova



Aperis programo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto

Ni ĝojas informi, ke jam aperis programo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto kaj de la Virtuala Movada Foiro. Vi povas vidi, ke ĝi estas riĉega kaj eblas trovi programerojn de multaj niveloj kaj preskaŭ por ĉiuj gustoj.



Programo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto kaj de la Virtuala Movada Foiro:

<https://mallonge.net/fh>.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 2-a VK, ni invitas fari tion ĉe: <https://vk.esperanto.net>.



Kinejon dum la VK inaŭguros Varsovio cent jarojn poste

Dum la ĉi-jara VK okazos virtuala Kinejo. Ĝiaj programeroj komenciĝos jam la 16-an de julio, tagon antaŭ la oficiala Malfermo de la Kongreso.

Inaŭguros Kinejon la filmo *Varsovio cent jarojn poste* (1987). Ĝi estas filmraporto (61 min.) de Roman Do-

brzyński pri la 72-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Varsovio, Pollando, en 1987. Ĝi okazis en la Jubilea Jaro de Esperanto (1887–



1987), 100 jarojn post la eldono de la Unua Libro en Varsovio. La UK okazis de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987, rekorda: 5946 aliĝintoj el 73 landoj. La kongresejo estis en la prestiĝa kaj giganta “Pałac Kultury i Nauki” (Kultur- kaj Scienc-Palaco) en la urbocentro de Varsovio. La kongresa temo estis “Cent jaroj de internacia kulturo”. La raporto pri la jubilea 72-a UK



en Varsovio estas grava dokumento kaj aparte interesa pro la brilaj oratoraĵoj de Humphrey Tonkin, tiama prezidanto kaj nuntempa honora prezidanto de UEA.

Roman estis tiam prezidanto de Pola Esperanto-Asocio kaj mem de la Loka Kongresa Komitato kaj strikte kunlaboris kun Humphrey kiel prezidanto de UEA. La preparado de la grandega kongreso en malfacilaj politikaj cirkonstancoj estas fascina historio neniam ĝis nun priskribita. Roman redaktis la filmon unue en la pola lingvo kaj prezentis ĝin en la Pola Televido. Poste okazis la redakto en Esperanto. Post 34 jaroj la voĉtrako de la filmo estas perfekte aŭdebla, sed bildoj iomete paliĝintaj, ta-men akcepteblaj. Ĝi principe vendiĝis memstare kiel VHS-PAL. Poste aperis en DVD kune kun la filmo “La centjara Esperanto”.





Tago de Lernado ene de VK2


Jam de Jardekoj tiu Tago okazigita de ILEI havas gravan lokon en la kongresaj programoj de UEA. Tradicie, tio estis la krona evento de la Tago de Kapabligo, ĉiam en la kongresa mardo. Simile okazos ĉi-jare, kun la aranĝo de premier-ranga programo okazonta denove en la mardo, kaj aranĝita kiel jam multjare de Marija Beloŝeviĉ el Kroatio...



En la programo:

2021-07-20, 12.00-16.59 UTC:
(CEST du horojn pliposte)

- 12.00-12.00:** Salutoj: prezidantoj de UEA kaj ILEI
- 12.10-12.40:** Duncan Charters: Paco kaj konfido en la mondo de edukado
- 12.40-13.00:** Mireille Grosjean: Ne okazas lernado sen fido
- 13.00-13.30:** Goro Christoph Kimura: Kio estas interlingva diverseco kaj kial ni bezonas ĝin?
- 13.30-14.00:** Martina Kvarantan Šmitran: De aplaŭdo al konfido – filmita
- 14.00-14.30:** Mónika Molnár: Konfido kaj memkonfido en la klasĉambro
- 14.30-15.00:** Diskuto
- 15.00-15.30:** Katalin Kováts: Per kio kion kaj kiel instrui?
- 15.30-16.00:** Dennis Keefe: Praktika bildvortaro, filmita
- 16.00-16.30:** Vicente Manzano-Arrondo: Iniciato "Esperanta universitato"
- 16.30-16.50:** Diskuto
- 16.50-16.55:** Fermo



Veraj Virtulaj Kvizoj

Veraj Virtulaj Kvizoj estos trifoj prezentitaj dum la Virtuala Kongreso de Esperanto.

Precize: dimanĉe je la 17.30, lunde je la 17.30 kaj marde je la 17.00.

Ili estis pli frue prezentitaj dum la Argentina kaj Aŭstralia Virtualaj Kongresoj.

Nivelo de kvizoj (enigmoj, demandoj) estas diversa: facila, ne tro facila kaj malfacila!

Do, ĉiu povas kontroli sian scion rilate al Esperanto, sed ne nur pri Esperanto... ĉar ĉ. duono de kvizoj enhavas ĝeneralajn enigmojn kaj demandojn.



Gajninto kun la plej multaj punktoj dum la tri tagoj – estos honorigita per membreco en UEA – laŭ kategorio MA-21, tio estas Membro-Abonanto por 2021, kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon *Esperanto* papere.

La 2-a kaj 3-a loko per membreco laŭ kategorio MB-21.

Provu formon de iuj kvizoj (kun ege facilaj enigmoj) laŭ la ligilo: (speciale atentu la lastan paĝon kun ligilo al sekva kvizo!)

<https://learningapps.org/view7329573>

Virtualaj Kvizoj gvidos Marian Zdankowski (Pollando).




Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio redakcio@revuoesperanto.org





Sanskrito, multmaniere la malo de Esperanto

Sanskrito estas multmaniere la malo de Esperanto. Ĝi estas nek malambigua, nek facile lernebla, senapologie tia. Tial tamen ĝi havas kelkajn ĉarmojn tute male al tiuj de Esperanto. En tiu interesege prelego de la 2-a Virtuala Kongreso (<http://vk.esperanto.net>) vi ĝuos la prezenton de la lingvo mem kaj ĝiaj belecoj kaj same la komparon kaj kontraston kun Esperanto.



Postnikov. Nun la teatraĵo disponeblas por la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto, memore al la forpasinta kolego Mico Vrhovec, kiu ludis Zamenhofon. Saša Pilipoviĉ invitas vin aliĝi kaj spekti. Spektu la anoncon ĉe UEA Viva: <https://youtu.be/s4t9RVNF6SY>



La Esperanto- kurso por hispanparolantoj

Unu el la ĉefaj agadoj de UEA finis sian duan okazigon: la Esperanto-kurso por hispanparolantoj fermiĝis la 10-an de julio, post dumonata praktikado kun 12 instruistoj kaj centoj da lernantoj el diversaj



landoj. La rezulto estas nekredebla. Eblas re-spekti la فرمان ceremonion en UEA Viva: <https://youtu.be/dV0U7XJwVfI?t=97> – salutas la instruistojn kaj lernantojn Duncan Charters, Fernando Maia kaj Martin Schaeffer deflanke de UEA. Klara kaj Albert prezentas al ili TEJO-n. Aparte ĝojiga estas la momento, kiam la lernantoj dividas siajn atestojn kaj impresojn pri la kurso. Iri rekte al tiu parto de la fermo eblas per la jena ligilo: <https://youtu.be/dV0U7XJwVfI?t=2968> – ĉiuj lernantoj estis speciale invititaj al la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto, venu konatiĝi kun ili. Koran dankon al Kolombia Esperanto-Ligo, Hispana Esperanto-Federacio, TEJO kaj ĉiuj bravaj 12 instruistoj! Se vi volas subteni tiun agadon, via donaco bonvenas al la Fondaĵo Ameriko de UEA: uea.org/alighoj/donacoj/ameriko.



Dek tagoj de kapitano Postnikov dum virtuala kongreso


Dek tagoj de kapitano Postnikov estas romano verkita de Mikaelo Bronŝtejn, dediĉita al realaj eventoj okazintaj en Rusio antaŭ cent jaroj. La ĉefa rolulo de la romano, Aleksandr Aleksejeviĉ Postnikov, estas lerta, eksterordinara persono, artileria oficiro, kiu partoprenis du militojn en la Oriento kaj ricevis ordenojn. Kiel senlaca iniciatinto de la ideo de universala internacia lingvo, Esperanto, li organizis kaj sukcese okazigis la unuan rusan kongreson de Esperanto en 1910 en Sankt-Peterburgo. En 1911 A.A. Postnikov estis arestita kaj, sub falsaj akuzoj de spionado, kondamnita al senigo de nobela titolo, rangoj, ordenoj kaj trudlaboro por periodo de 8 jaroj. La romano estis adaptita al la teatro kaj prezentita dum la 96-a Universala Kongreso (UK) de Esperanto, kiu okazis ekde la 23-a ĝis la 30-a de julio 2011 en Kopenhago. La teatraĵon faris la asocio de dramaj artistoj de Serbio "Savez Dramskih Umetnika Srbije", kun Saša Pilipoviĉ en la rolo de Aleksandr





Pli da tuja kontakto dumkongrese danke al Telegramo!

Ĉu vi dezirus senpere komuniki interesaĵojn al aliaj partoprenantoj de VK? Ĉu vi havas demandojn pri la programo? Ĉu eble iu teknika problemo aperas? Ĉu vi scivolemas pri detaloj de iu aparta programero? La organiza teamo forte rekomendas uzi por tiuj celoj aplikaĵon **Telegram** – danke al kiu vi povos esti plej rapide informata pri diversaj aferoj, rilataj al VK.



Danke al Telegramo eblas plej rapide kaj efike solvadi ankaŭ viajn teknikajn problemojn (kiuj kutime postulas rapidan interagon), aŭ informi pri programo de VK.

Telegramon eblas instali kiel apon (aplikaĵon) en vian saĝan telefonon – <https://telegramo.org/>. Ekzistas ankaŭ porkomputila versio. Por komuniki kaj/aŭ diskuti pri VK bonvolu eniri tiun ĉi grupon: **Virtuala Kongreso** – <https://vk.telegramo.org>. Tiel ni povas havi eĉ pli proksiman kontakton unu kun la alia dum la tuta semajno (kaj eĉ poste).

Ni esperas, ke vi ĝuos la VK-programon kaj ke vi ŝatos ankaŭ ĉi-specajn programerojn! Ni jam senpacience atendas vian partoprenon en tiu riĉega 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto! UEA dankas pro via interesiĝo kaj subteno.

Via VK-teamo!



Aktualigo: Nuligo de la funela sesio de la 2-a Virtuala Oratora Konkurso

Kiel parto de la 2-a VK denove okazos Oratora Konkurso por la junularo.

La funela sesio, antaŭvidita por la 16-a de julio ne okazos. Kandidatoj venos sur la virtualan scenejon rekte en la 21-a de julio, merkrede, de la 15:00 ĝis la 16:00 UTC.

Sekve la aliĝperiodo estas nun iom pli longa. Interesitoj skribu anoncu sin ĝis la 19-a de julio, al la Komisiono de UEA pri Oratora Konkurso pere de la membroj Giridhar Rao rao.giridhar@apu.edu.in kaj Leandro Abrahão leandro.brazilo@gmail.com.

Legu la plenan alvokon por ekscii pli:

<https://uea.org/gk/960a1>.

Kompleta regularo de la konkurso troviĝas en la retejo de UEA. Prepariĝi oni povos i.a. sekvante la kurson de parolarto [#forlaflatado](https://forlaflatado) senpage ofertata de UEA ĉe <https://mallonge.net/fi> aŭ rekte en la virtuala kongresejo, la 19-an de julio, lunde, 8h30-10h UTC. Kaj legante la librojn pri retoriko en Esperanto: <https://mallonge.net/retoriko>.

La organizantoj bondeziras al la kuraĝuloj, kiuj partoprenos, kaj esperas, ke tiu ĉi kongresero estos tiel populara kaj amase spektita, kiel estas tradicie kaj pasintjare.



Partoprenu programerojn, dediĉitajn al la ĉefa temo de la 2-a VK: "Paco kaj konfido: universalaj valoroj". Sekvu la kongresan programon kaj *La Kolombo de Paco*.

